

"Oni povas trompi ĉiujn homojn iom da tempo;  
oni povas trompi kelkajn homojn ĉiom de tempo;  
sed oni ne povas trompi ĉiujn homojn ĉiom da tempo."

Abraham LINCOLN

# BAZARO

---

**Esperantlingva revuo, Cluj-Napoca, Jaro II, Numero 2 (5)**  
**1998, Somero**

---



ISSN 1453-7478

## ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por Rumanianoj estas 2.500 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por KOLOZSVÁRI Zsolt aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

## ALVOKO !

BAZARO intencas aperigi la liston de Rumaniaj geesperantistoj, tiucele bonvolu sendi urĝe viajn datumojn.

Personoj enlistigitaj havos nenium devon, ekzemple gastigi aliajn esperantistojn, loĝigi aŭ helpi ilin. Tiu listo servos nur kiel adresaro kaj dokumento pri la nombro kaj loĝloko de geesperantistoj en Rumanio.

Tiusence mi petas vin fotokopiu la jenan formularon, disdonu ĝin inter la geesperantistoj de via klubo aŭ urbo kaj plenigite resendu al ni. Vi povas nur simple skribi sur blanka papero la datumojn petatajn de la formularo kaj sendi ĝin al la redakcio.

Familia nomo:

Naskiĝdato:

Adreso:

Urbo/vilaĝo:

Telefono:

Persona nomo:

Sekso: vira\vrina

Poŝtkodo:

Profesio:

Laŭdezire vi povas malplenigi unu aŭ pli da rubrikoj, pri kiu vi opinias, ke ĝi restu "sekreto".

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendadas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

*Redakcio:*

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ

RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111

RUMANIO

*Eldonas:*

Eldonejo DOKIA

P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,

RUMANIO kaj

MUNICIPA KULTURDOMO

P-ta Unirii n-ro 24

RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO

*Redakcia komitato:*

Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia,

KOLOZSVÁRI Zsolt

*Aperas:* kvaronjare

*Redactia:*

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ

RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111

ROMANIA

*Editata de:*

Editura DOKIA

P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,

ROMANIA si

CASA MUNICIPALA de CULTURA

P-ta Unirii nr. 24

RO-3400, Cluj-Napoca, ROMANIA

*Comisia de redactie:*

Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia,

KOLOZSVÁRI Zsolt

*Apare:* trimestrial.

## ANTAŬ 30 JAROJ...

Dum mia pli ol kvar jardeka esperantisteco mi havis multajn, neforgeseblajn memorajojn. Mi partoprenis kvar UK-ojn, du foje IKUE/KELI kongresojn kaj diversajn naciajn E-renkontiĝojn.

Antaŭ 30 jaroj mi partoprenis ia unuan PIF-on en Zagrebo. Kelkaj entuziasmaj gejunuloj elektis el diversaj proponoj de Tibor SEKELJ kaj ili organizis Pupteatran Internacian Festivalon en 1968.

Pupteatra spektaklo estas ĝuebla, eĉ se oni ne komprenas la tekston, - memkompreneble nur se la spektaklo estas bona, t.e. el la movoj de la pupoj oni povas kompreni, kion ili volas diri kaj esprimi -, sed multe pli ĝuebla estas, se ankaŭ la teksto estas komprenebla.

Dum jardekoj PIF-on partoprenis Pupteatroj el ĉiuj kontinentoj. Neimageble ĝuiga estis rigardi pupteatran spektaklon Esperantlingve prezentitan el Afriko, Azio, Aŭstralio, Usono kaj el diversaj landoj de Eŭropo, kaj kompreni ĉion, kion diras kaj kantas la pupoj!

En 1968, Ŝtata Pupteatro el Cluj-Napoca partoprenis la I-an PIF-on en Zagrebo. Mi mem tradukis la tekston kaj mi gvidis la kurson por miaj gekolegoj. Granda estis nia ĝojo gajni la unuan premion!

El tiamaj 19 Ŝtataj Pupteatroj en Rumanio, nia pupteatro estis la unua, sed ne la sola, kiu partoprenis PIF-ojn, kelkaj partoprenis eĉ plurfoje, kaj ĉiam preskaŭ ĉiuj estis premiitaj. Jen la listo:

Alba-Iulia (1974), Bacău (1977), Baia-Mare (1980), Brasov (1976), Brăila (1976), Bukareŝto (1990), Cluj-Napoca (1968; 1969; 1972; 1977; 1996); Constanta (1970; 1971; 1972; 1981; 1984), Craiova (1972), Galati (1975; 1982), Iasi (1973), Oradea (1975), Ploiesti (1971) kaj Târgoviste (1984).

La Ŝtata Pupteatro el Cluj-Napoca prezentis diversajn popolfabelojn rumanajn kaj hungarajn (ekz. de Ion CREANGA, de MÓRICZ Zsigmond). Por la traduko de BESTFABELOJ de MÓRICZ Zsigmond, mi petis la helpon de karmemora KALOCSAY Kálmán, ĉar la traduko de la poemoj ŝajnis al mi tro malfacila. Krom premio ni ricevis ankaŭ inviton al TV de Sarajevo, kaj en 1973 oni filmis tie la belegan spektaklon kun la bonega teksto-traduko de KALOCSAY. Eĉ post 25 jaroj, kun dankemo mi pensas pri lia grandanima helpemo.

La iamajn gejunulojn (Pajo, Spomenka, Mladenka, Pero, Roger k.a.) mi ne forgesos ĝis morto, same al Tibor SEKELJ mi pensas kun dankemo- kaj respektoplena amo!

Dankon, karaj Geamikoj!

‘SIGMOND Júlia, CLUJ-NAPOCA

## INTERNACIAJ RADIOELSENDOJ EN ESPERANTO

La horoj de la elsendoj estas laŭ la oficiala Somera Rumania Tempo (Horo de Moskvo)!

### *Ĉiutagaj elsendoj*

Horo	Stacio	Frekvenco	Kaptebla
07:30-08:00	Pola R. Varsovio	Sat(1)	Eŭropo
15:00-15:27*	Ĉina R. Internacia	7170, 9535	Orienta Azio, Japanio, Koreio
17:00-17:27*	Ĉina R. Internacia	11840, 11600	Sudorienta Azio
16:30-17:00	Pola R. Varsovio	7305, 7285, Sat(1)	Eŭropo
21:00-21:30	Pola R. Varsovio	6095, 7205, Sat(1)	Eŭropo
23:30-23:55	Pola R. Varsovio	7285, 7270, 6035, 6095	Eŭropo
0:00-0:27*	Ĉina R. Internacia	7405, 9965, 9900	Eŭropo
02:30-02:57*	Ĉina R. Internacia	6860, 6950	Latin-Ameriko, Eŭropo
0:00-24:00	WRN / Pola Radio	TTT: <a href="http://www.wrn.org/stations/poland.htm">http://www.wrn.org/stations/poland.htm</a>	
0:00-24:00	Estonia Radio	TTT: <a href="http://www.er.ee/Tallin/espeesti.ram/">http://www.er.ee/Tallin/espeesti.ram/</a>	

### *Dimanĉaj elsendoj*

Horo	Stacio	Frekvenco	Kaptebla
08:05-08:30	R.Aŭstria Internacia	6155, 13730, Sat(2)	Eŭropo
11:00-11:30*	R. Havano Kubo	9820	Pacifika Azio, Norda Ameriko
18:05-18:30	R.Aŭstria Internacia	6155, 13730, Sat(2)	Eŭropo, Okcidenta Afriko
19:00-19:30*	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
22:20-22:30	R. Vatikana	1530, 5882, 4005, 7250, Sat(3)	Eŭropo
22:20-22:30	R. Vatikana	Sat(4)	Ameriko
23:30-24:00*	R. Havano Kubo	9550, 13715	Eŭropo, Mediterraneo
02:00-02:30*	R. Havano Kubo	9550, 13715	Eŭropo, Mediterraneo
03:05-03:30	R.Aŭstria Internacia	9870	Latin-Ameriko
03:30-04:00*	R. Havano Kubo	11760, 11875, 6070	Ameriko, Karibio

*Dum aliaj tagoj*

22:20-22:35	R. Vatikana	1611, 6185	Eŭropo (merkrede)
22:20-22:35	R. Vatikana	Sat(5)	Azio, Afriko (merkrede)
0:00-0:20*	RAI Internacia	9655, 11860, Sat(6)	Eŭropo (sabate)

\*Programo kies horo estas konstanta laŭ la UTC (do ŝanĝiĝos ekde 25-an de oktobro 1998, kiam ŝanĝos ankaŭ la Oficialan Rumanian Tempon).

*Satelitaj indikoj*

- (1) Pola Radio Varsovio, Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) Radio Aŭstria Internacia, Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayern 3), 8.10 Mhz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (3) Radio Vatikana, Eutelsat II F1 13 E, 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz (Eŭropo)
- (4) Radio Vatikana, Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
- (5) Radio Vatikana, Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
- (6) RAI Internacia Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.466 GHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz

Fonto: OSIEK - AERA, *Amikaro de Esperanto en Radio*

<http://members.aol.com/OSIEK/AERA>>

## LA SOMERAJ TRAVIVAĴOJ ĈIAM RESTOS EN MIA ANIMO

Ĉi somere, mi kaj mia edzo, laŭ la invito de nederlandaj geamikoj, havis belegan veturadon, neforgeseblajn travivaĵojn en lando, kie ĉio rezultas el suita-homa laboro-agemo, per Dia beno.

Per la financa kaj anima helpo de niaj geamikoj: familio Yong kaj Shouten, ni povis trae-retrae veturi Nederlandon per aŭto kaj trajno. Laŭ la plano de niaj gastigantoj, ili alterne montris al ni iun kaj alian parton de ilia patrujo.

La 23-an de majo, el Apeldoorn, frumatene ni ekveturis al Roterdamo. Ĉe la biletaĉetado, ni kiel geemerituloj kvardek procenton ĝuis. Belega, granda urbo estas Roterdamo, sed por esperantistoj ĝi estas la plej granda, plej grava en la mondo, post la naskiĝurbo de Zamenhof. ĉar ĉi tie troviĝas la centro de UEA. El stacidomo ni piede promenadis ĝis la domo de UEA. Tie oni afable bonvenigis nin. Kiel en abelujo, tiel ili laboris. Ni konatiĝis kun s-ro Osmo BULLER, direktoro de Centra Oficejo de UEA. S-ro Rob MOERBEEK, universitata profesoro, gvidis

nin en la C.O. Ĉie, de la planko ĝis plafono estas bretoj por libroj. Fiere li prezentis la malnovajn kaj novajn librojn, eldonajojn. Inter la pli novaj libroj estas kiel bela perlo, kolekto de kopioj de manuskriptoj de L.L. ZAMENHOF. En alia ĉambro kelkaj junuloj el diversaj partoj de la mondo laboris antaŭ komputiloj. Ili pretigis la revuon "ESPERANTO". Nia gvidanto ridete prezentis al ni la ĉefredaktoron ERTL István. Mia edzo, kiu ne parolas esperante, ĝoje turnis sin al lia samlingva junulo.

Post taso da kafo kaj teo, kio estas propramane farita de profesoro, ni vizitis malgrandan ĝardeneton, en kiu jam velkante pompis la "Esperanto" tulipoj. Siaj petaloj estas helciklamenkoloraj kun verda konturo.

La tempo forflugis, ni adiaŭis de Esperanto Centro, elirinte kun plen-plena koro, kun plena animo kun neforgeseblaj travivaĵoj. Mia koro estis ĝojplena, ĉar mi povis uzi mian ŝatatan Esperanton. Mi forgesis, ke mi estas eterna komencantino. Miaj manoj estas plenaj de libroj ricevitaĵ de s-ro Milojeviĉ.

Ĝis revido, ni salutis.

Poste ni vizitis ankaŭ muzeon. Multe da interesaj pentraĵoj de Rembrandt, Rubens, van Eyck, van Gogh, ktp. plezurigis nin.

La tago forpasis. Ni estis tre lacaj, sed kontentaj. Ni pliriĉiĝis anime, konante novajn homojn kaj sennombrajn kreitaĵojn de la homo.

JUHÁSZ Ibolya, VADU CRISULUI

## NOVAĴOJ

### LA LASTA ELIRO - Fino de la Tempoj - Tria jarmilo

Detala kaj serioza studo pri la antaŭdiroj de la profetoj ekde Jesaja ĝis la nuntempaj predikantoj, inkluzive de Jesuo, la Kristo, pri la evoluado de nia planedo kaj de la ĉi tie loĝanta homaro.

Mendu ĝin, ĉe U.E.A. aŭ rekte ĉe la eldoninto: SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ - Caixa Postal 3133 - BR-20001-970 Rio de Janeiro - BRAZILIO.

En la jusaperinta horarlibro de SNCFR (Rumanaj Fervojoj) kio validas ekde 24-an de majo 1998 ĝis 25-an de majo 1999, la ĝeneralaj informoj denove aperis ankaŭ en Esperanto. Krome, en tiu periodo la rapidtrajno cirkulanta inter Bukareŝto kaj Sibiu ricevis la nomon ESPERANTO!

Aperis la libro **DRAKULA** de Ioan SÂRBU. Krom la konciza biografio de Drakula, ĝi enhavas ankoraŭ dek novelojn tradukitajn el la rumanlingva literaturo.

Ĝi mendeblas ĉe Ioan SÂRBU, b-dul 15 Noiembrie 92, sc.C, ap.8, RO-2200 BRASOV, RUMANIO.

Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:

**KORESPONDA SERVO MONDSKALA**

B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin. Ni dankas al:

**MUNICIPA KULTURDOMO**, ĉar ebligis al ni redakti la 4-an numeron de **BAZARO**.

**En la zorgo de Eldonejo DOKIA aperis du libroj:**

**Alti pasi în Esperanto** de Ionel ONET, 68 paĝa, formato A5, kiu enhavas Rumana - Esperanto vortaron, E-gramatikon, Rumanajn toponimojn en Esperanto kaj Rumanan Esperantistan Bibliografion. Prezo: 8000 leoj+sendokostoj.

**Documente Esperanto** de Ionel ONET kaj Sasha VLAD, en rumana lingvo, 38 paĝa formata A5, antologio dediĉita al 110 jariĝo de lingvo Esperanto kaj al la 80-a datreveno de la morto de Zamenhof. Prezo 4000 leoj+sendokostoj.

Ambaŭ libroj estas mendeblaj per ramburso ĉe *Radu CRETU str. Padin 28/19, RO-3400, CLUJ-NAPOCA, RUMANIO*

Inte: 1-3 de majo 1998 okazis **Nacia Esperanto-Kongreso** en Timisoara. La kongreson partoprenis ĉ. 40 geesperantistoj el Baia-Mare, Oradea, Bukareŝto, Craiova, Slatina kaj Timisoara.

En la unua tago ni aŭskultis diversajn raportojn kaj ni elektis la novan estraron de REA. La kongreso decidis, ke la prezidanto de REA estos s-ino Aurora BUTE, vicprezidantoj, Dorin HEHN (Timisoara), Marian CONSTANTINESCU (Bukareŝto) kaj Emil CRÂNCAU (Baia-Mare), ĝenerala sekretarino Florica POPA (Timisoara).

En la dua tago okazis simpozio pri la temo: **Ĉu Esperanto estas facila lingvo?**

Prelegis: s-ro Ignatiu ORHA (Baia-Mare)  
 s-ino Minerva BOCSA (Timisoara)  
 s-ro Marian CONSTANTINESCU (Bukareŝto)  
 s-ino Aurora BUTE (Timisoara)  
 s-ro Dorin HEHN (Timisoara)  
 s-ino Mariana PITAR (Timisoara)  
 s-ro Emil CRÂNCAU (Baia-Mare)  
 s-ro Marian VOCHIN (Bukareŝto), ktp.

Dum la E-kongreso, s-ino Maria SECULA prezentis interesan teatraĵon kaj la gelernantoj de s-ino Olimpia GUIU kantis E-kantojn.

En la tria tago ni vizitis la vidindaĵojn de la urbo Timisoara.

La kongreso decidis organizi almenaŭ du E-kunvenojn jare. La sekvonta kunveno okazos aŭ en Brasov aŭ en Bukareŝto ĉi-jare en septembro.

Florica POPA, TIMISOARA

## LA HISTORIA URBO SUCEAVA

Ĉefurbo de samnoma distrikto kuŝanta je 400m alteco sur altebenajo, antikvas ĝis XII-a jarcento, sed 1338 ĝi fariĝis Urbo-Ŝtato, kaj spertis la plej fortan prosperon dum la regado de Ŝtefano la Grandulo (1457-1504). Inter 1775 kaj 1918, la urbo apartenis al la Aŭstra Imperio.

Suceava, kiel elirpunkto al famkonataj monaĥejoj, Voronec (43km okcidenten), Humor (50km okcidenten), Moldovica (93km okcidenten), Sucevita (119km okcidenten), ĝi kuŝas je 433km distanco de Bukareŝto (ĉefurbo de Rumanio) kaj 320km distanco de Cluj-Napoca.

La nomdeveno latina Sucidava (dava=civito de Suĉio) atestas romianan ekspansion komence de postkrista erao, ankaŭ eĉ trans la Orientaj Karpatoj.

Inter la turismaj interesajoj, krom la mondfamaj monaĥejoj (premiitaj en 1975 per internacia "Orpomo" far Internacia Ĵurnalista kaj Verkista Federacio), ankaŭ la popolvestaĵoj, la popola domarhitekturo, keramikaĵoj, ktp.

Dum via restado vizitindas jenaj cellokoj:

-Historia muzeo, meze de la urbo. La "Tronsalono" surscenigas la etoson iaman ĉe kortego de Ŝtefano la Grandulo.



-Princgastejo, antikvas ĝis XVI-a jc.; ĝia ĉambro enhavas tradiciajn manfaritaĵojn.

-Preĝejo "Mirauci", antikvas ĝis la XIV-a jc.; tie estis kronigitaj la unuaj princoj de Moldavio.

-Monaĥejo "Sankta Johano", en kiu kuŝas relikvoj de Sankta Johano ekde 1402 j., kaj definitive de 1783, post 97 jara restado en Pola Reĝlando.

Aliaj urbaj vidindaĵoj estas:

-La antikva fortikajo de Suceava, konstruita je la fino de la XIV-a jc., kiu kontraŭstaris al sieĝo de la armeo de Mahometo II, konkeranto de Konstantinopolo (1476);

-La 22m alta statuo de Stefano la Grandulo surĉevale, staras oriente de la fortikajo, super la arbaro;

-En la norda parto de la urbo altiĝas la ruinoj de la fortikajo Scheia, kiu datiĝas el la XIV-a jc.;

-En la okcidenta parto de la urbo troviĝas Preĝejo Zamca, konstruita en stilo gotika kaj en klasika bizanca;

Vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo de Suceava:

-Nordoriente, je 12km distanco, troviĝas la monaĥejo Dragomirna, konstruita en 1602, sub influo de gotika kaj bizanca stiloj;

-Je 8km distanco, ĉe la vojo al Dragomirna, troviĝas la gastejo Adâncata kaj kampadejo.

-Okcidente, je 18km distanco de Suceava, survoje al monaĥejo Voronec troviĝas la gastejo Ilisesti (50 litoj).

prof. Nicolae MACOVEI, BRODINA DE SUS

## ŜAUL KIMEL

Kuracisto kaj esperantisto en Rumanio (1875-1830)

Ŝaul KIMEL (kuracisto) naskiĝis en 1875 kaj esperantistiĝis en 1907, kiam li partoprenis en Esperanto-kursoj, kiujn organizis d-ro Gabrielo Robin, kuracisto-mikrobiologo kaj pioniro de la Esperantomovado en nia patrujo, Rumanio.

Ŝaul KIMEL estis membro-fondinto de la Rumana Esperantista Societo (RES). Je la 14-a de novembro 1907 malfermiĝis la unua, publika Esperanto-kurso, kiun gvidis Ŝaul KIMEL kaj en kiu partoprenis 60 personoj. Pro la malsamaj opinioj kun d-ro G. ROBIN je la 14-a de marto 1908 li ekŝiĝis pri sia funkcio kiel kasisto enkadre de R.E.S. kaj li aliĝis al Federacio de la Esperanto-Societo el Rumanio, en urbo Galati (Galac), kie d-ro Ŝaul KIMEL iĝis la direktoro de la revuo: "Rumana Gazeto Esperantista".

D-ro Ŝaul KIMEL verkis kaj publikigis tri eldonojn en 1908-1909 la rumanan Esperanto-lernolibron, titolita: "Curs complet si practic pentru învățarea Limbii Esperanto în putine lectiuni" (Kompleta kaj praktika kurso instrui la Esperanto-lingvon pere de malmultaj lecionoj), kiu havis unu suplementon "CHEIE" (ŜLOSILO) de la kurso por solvi la ekzercojn el la lernolibro. Lia intenco estis laŭdebla, sed ĉi-tiu lernolibro estis riĉa en eraroj, sekve en la revuo: Rumana Esperantisto, n-ro 5/1909, sur la p. 136 P. IONESCU publikigis kritikan artikolon.

Ŝaul KIMEL en Bukareŝto enkadre de la Hospitalo Coltea (Kolcea) organizis esperantistan grupon, nomita: "ESPERANTO", kiu estis aliĝinta al la "Federacio de la Esperantistaj Societoj" en Galati (Galac).

L. L. ZAMENHOF sendis multajn leterojn al Ŝaul KIMEL. Kiam L. L. ZAMENHOF ricevis la lernolibron de d-ro Ŝaul KIMEL, li sendis jenan respondon: "KARA KOLEGO, vian leteron mi ricevis kun plezuro kaj danko. Mi deziras al via libro la plej bonan sukceson; mi esperas ke via verko forte puŝos antaŭen mian aferon en via lando. Por la dediĉo volu akcepti mian dankon. Via, L. ZAMENHOF; VARSOVIO, 22-IX-1908."

Post la unua mondmilito la poresperantista agado de d-ro Ŝaul KIMEL preskaŭ ĉesiĝis. Li forpasis en 1930 kaj por la nuntempaj rumanaj esperantistoj, kiam alproksimiĝas la naŭdekjara jubileo de U.M.E.A. (Universala Medicina Esperanto-Asocio) kaj U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio), kiujn ni solenos okaze de 83-a U.K., ni devas rememori ankaŭ pri Ŝaul KIMEL. Li estis kuracisto kaj samtempulo de nia Majstro je la komenco de nia jarcento.

Laŭ originala rumanlingva teksto de Marian VOCHIN esperantigis, D-ro LÁZÁR Gábor, ĉefkuracisto de Urba Hospitalo COVASNA

## LA ESTINTECO KAJ LA ESTONTECO DE LA LINGVOJ

Estas bone konata la fakto, ke multegaj da lingvoj estas parolataj sur la tero. Eĉ la lingvistoj ne povas diri la precizan nombron de la homaj lingvoj. Multfoje, estas malfacile decidi, kiam oni devas konsideri du lingvojn kiel apartaj lingvoj, aŭ kiam unu el ili estas nur dialekto de la alia. Krome troviĝas multaj lingvoj, parolataj de malgrandaj triboj kiuj jam malaperis kaj aliaj kiuj, verŝajne, baldaŭ malaperos. Jam la diversaj homaj grupoj ne plu vivas izolitaj, kiel antaŭe, kaj ne plu aperos novaj

lingvoj, escepte la eblajn aperojn de kelkaj artefaritaj lingvoj, kies graveco ŝajnas esti nun tute sensignifa.

Laŭ la legendo de la Biblio, la unuaj homoj parolis la saman lingvon. Sed kiam ili volis konstrui la "Turon Babelo", Dio intermiksitis iliajn lingvojn, por ke ili ne plu povu kompreni unu la alian. Por la nuntempaj homoj tiu ĉi klarigo ĝenerale ne sufiĉas. Do, ni vidu kion diras la hodiaŭa scienco, kial ekzistas tiom da lingvoj.

Oni povas facile observi similecojn inter kelkaj lingvoj. La lingvoj mem ne estas senŝanĝemaj. La lingvistoj, observinte la similecojn de la lingvoj kaj malkovrinte la leĝojn laŭ kiuj ŝanĝiĝas la lingvoj, klasifikis ilin en diversaj lingvofamilioj. Ili asertas, ke tiuj popoloj, kiuj apartenas al la sama lingvofamilio, iam - en kelkfoje fora estinteco - vivis kune, parolante la saman komunan pralingvon. Por kelkaj lingvofamilioj, la lingvistoj jam sukcesis rekonstrui tiujn pralingvojn, sed por aliaj, ĉefe por tiuj kiuj ne uzis la skribadon, kaj tiel ne restis pri ili malnovaj dokumentoj, la afero estas pli maifacila.

Sed ankaŭ la nombro de la lingvofamilioj estas sufiĉe granda. Ĉu iliaj pralingvoj ne montras similecojn kaj pro tio, ĉu ili havis komunan originon? Ŝajnas, ke la respondo al tiu ĉi demando estas jesa, kaj ke tiuj pli malnovaj pralingvoj ŝajnas, ke originas el eĉ pli malnovaj pralingvoj. Eblas, ke fine restos nur unu tre malnova lingvo, la vera pralingvo de la tuta homaro. Estas fantazia, nekredebla, sed ŝajnas, ke la lingvistoj jam sukcesis eltrovi tiun pralingvon!

Estas tre interesa! Kelkaj lingvoj ŝajnas tiel malsimilaj, ke nur malfacile oni povas akcepti ke ili havas komunan originon. Sed el la historio de la homaro ni konas nur ĉirkaŭ ses miloj da jaroj, kvankam ni scias, ke la unuaj homoj aperis antaŭ cent miloj da jaroj aŭ eĉ pli antaŭe. Pri la historio de tiuj malnovaj epokoj, ni havas nur malmultegajn konojn. Kaj ni scias, ke kvankam la diversaj homaj rasoj, kiel nigriuloj, blankuloj, flavuloj, ktp., malgraŭ la diferencoj, apartenas al la sama speco. Tiel ili povas havi komunan originon.

Mi legis interesan artikolon pri tiu ĉi en la usona gazeto "U.S. News & World Report". La titolo de la artikolo estis "The Mother Tongue" (=La gepatra lingvo). Tie estis priskribita, ke per diversaj, tre kompleksaj metodoj, kiuj krom la lingvistiko uzis la rezultojn ankaŭ de multaj aliaj sciencoj, grupoj de lingvistoj el kiuj kelkaj laboris antaŭe en la estinta Sovjetunio, sukcesis eltrovi la pralingvon de la homaro. Ili rekonstruis la vojojn per kiuj dum longa evoluo aperis la hodiaŭaj lingvoj el tiu pralingvo. Laŭ iliaj rezultoj, la malgranda homa grupo kiu parolis tiun pralingvon, vivis en Afriko antaŭ ducent mil jaroj.

Kompreneble nur kelkaj dekoj da vortoj estis eltrovitaj el tiu lingvo. Ekzemple, la akvo en tiu lingvo estis "haku"; la vorto kiu montris la agon de la manĝado estis "hita"; la vorto kiu signifis komence lupon kaj poste ankaŭ la hundon estis "kujan"; la vorto kiu signifas nun virinon en tiu lingvo estis "kuni"; kaj la persona pronomo por la unua persono, singularo estis "ngai".

Tiu ĉi estas nur teorio, hipotezo, kiu povas esti vera, sed ne tute certa. Ĉiukaze ŝajnas, ke la multnombraj homaj lingvoj aperis dum longega evoluo el nur sufiĉe malmultaj homaj lingvoj, kaj povas esti ke ĉiuj lingvoj vere aperis el nur unu pralingvo. Ĉi tiujn ni scias nun pri la estinteco de la lingvoj. Sed kion ni povas diri pri ilia estonteco?

La parolataj lingvoj ĉiam ŝanĝiĝas. La kondiĉo por aperigo de novaj parolataj lingvoj estis, ke ili devis resti izolitaj, kaj tiel alimaniere evoluis. Nuntempe la modernaj iloj de la komunikado ne plu permesas, ke la diversaj grupoj de parolantoj de ia lingvo restu izolataj unu de aliaj. Do, ne plu aperas novaj lingvoj, la diversaj dialektoj de la sama lingvo pli kaj pli proksimiĝas de unu al la alia, la ŝanĝiĝo de la lingvoj malrapidiĝas, dum kelkaj malgrandaj lingvoj malaperas. Do, la nombro de la lingvoj malkreskiĝas. Sed ĝis kiam? Ĉu eblas, ke fine restos nur unu universala lingvo de la homaro?

Kiu povus antaŭdiri la futuron de la homaro? Eblas, ke ni detruos nian planedon, sed ni estu optimismaj. Estas multegaj problemoj, kiuj bezonas solvon en la estonteco. La lingvoproblemo estas nur unu el ili. Nun ŝajnas, ke la angla lingvo estas la plej forta. Iom post iom, la homaro bezonos universalan lingvon, kiun ĉiu homo komprenu kaj parolu. Multaj popoloj ne ŝatus, ke ia nacia lingvo - kiel ekzemple la angla - estu akceptata kiel mondlingvo. Ĉiuj nacioj pli facile akceptus iun neŭtralan lingvon.

Do, eblas ke iam estos akceptata iu universala mondlingvo. Krom tiu ĉi lingvo ankaŭ la diversaj naciaj lingvoj povus resti, sed kiu scias, eble post jarcentoj aŭ jarmiloj, ankaŭ ili malaperos, kaj fine kiel komence, la homaro parolos nur unu komunan lingvon. Nun ankoraŭ estas malfacila se iam estos tia lingvo, kaj ni ne povas scii kiaspeca lingvo ĝi estos?! Sed ni povas esperi, ke ĝi estos nia lingvo **ESPERANTO!**

SIMON László, ORADEA

## KIAL MI ESPERANTISTIĜIS?

Fine de la jaro 1993, mi legis en iu loka ĵurnalo, ke Esperanto Asocio Oradea organizas kurson por lingvo Esperanto. Mi tuj enskribiĝis kaj dum studhoroj konstatante, ke la lingvo estas tre bela kaj facile

lernebla, mi decidis regule partopreni al ĉiuj studhoroj. Ĉar mi komprenis, ke la korespondado estas nepra kondiĉo por pli bona akiro de la lingvoscio, mi komencis korespondi, prenante la adresojn el Esperanto-revuoj kaj ankaŭ de miaj kurskolektoj.

En tiu ĉi momento mi korespondas kun geamikoj el Germanio, Finnlando, Belgio, Bulgario, Francio kaj Brazilio.

Mi konvinkiĝis, ke la korespondado estas efika, ĉar bonŝance miaj geamikoj bone regas Esperanton kaj iliaj leteroj estas veraj lecionoj por mi.

Estas tre agrable komuniki kun homoj de ĉiuj partoj de la mondo pere de leteroj, havi informojn pri iliaj vivo, moroj, kulturo kaj tiel plu. Ni interŝanĝos ankaŭ bildkartojn pri urboj kun belega kaj interesa arĥitekturo, pri naturaj, pitoreskaj aŭ monumentaj artaĵoj. Do, pere de lingvo Esperanto kaj korespondado ni povas amikiĝi kun homoj de diversaj nacioj kaj aranĝi reciprokajn vizitojn aŭ renkontiĝojn dum diversaj internaciaj eventoj, kiel Universala Kongreso, Esperanto Tendaro por junuloj kaj aliaj. Ankaŭ el nia Asocio, geesperantistoj partoprenis al IKUE-SAT, Fervojista, kaj Universala Kongresoj kaj ili rakontis al ni pri tiuj Esperanto-eventoj kaj pere de bildkartoj aŭ fotoj, ili kompletigis prelegojn.

Por geamikoj, kiuj ne povas veturi eksterlanden, nia Asocio organizas ekskursojn. Antaŭ du jaroj ni partoprenis du ekskursojn. Temas pri unu taga ekskurso al Vadu-Crisului, per vagonaro.

Ĉiĉerono estis nia samideanino JUHÁSZ Ibolya, profesorino de geografio kaj biologio, kiu parolis al ni en Esperanto pri interesaj aferoj lige de tiu loko.

Inter aliaj ŝi diris, ke la nomo de ŝia vilaĝo Vadu-Crisului (Rodo de Kriŝo) originas el pasinteco, kiam flose frajtis (transportis per floso) lignaĵon kaj salon el Transilvanio al Oradea kaj al Hungario.

En XIII-a jc. oni konstruis el ŝtono doganejon, alteniĝite sur rokmuro super la Kriŝo. Nun ĝia nomo estas FEOFORTIKAĴO. La fabelo diras, ke ĝi estas konstruita de feinoj kaj feo-reĝo loĝis en ĝi.

Nia ĉiĉerono interese parolis pri la SENFUNDA LAGO, al kiu ŝi kondukis nin. Ĝi estas la morta brako de la rivero Kriŝo, sed ĝi ĉiam havas akvon, ĉar en la lagon abunde enfluas grota fonto. Estas interese, ke la akvo ĉiam estas pura kaj tia ĝi restas eĉ post torenta pluvo. Oni supozas, ke la akvo longan vojon faras en la longa groto, kie ankaŭ subteraj lagoj povas esti. La vojo de la rivereto ankoraŭ estas nekonata. Oni fosis tie, sed ne povis eniri pli ol kelkajn metrojn. En la lago vivas

diversaj estaĵoj, kiel rano, fiŝo, testudo, trito kaj aliaj. La temperaturo de la fonto estas 11°C.

Ni vidis multajn vidindaĵojn en tiu loko, kaj estas agrable viziti ilin gvidata de tia ĉiĉerono, ĉar nur tiamaniere la ekskurso estis efika el ĉiuj vidpunktoj.

La dua unutaga ekskurso okazis al Kluĵo. La ĉiĉerono estis KANIZSAY Györgyi, origina el Oradea, nun profesorino pri lingvoj en Târgu Mures, kiu venis renkonti nin. Ŝi studis en Kluĵo, bone konas la urbon, kaj kondukis nin por viziti la plej interesajn lokojn: faman arĥitekturon, internon de kelkaj preĝejoj kun riĉa artaĵo kaj la grandan Botanikan Ĝardenon kun mirindaj, multkoloraj floroj.

Pasintjare ni denove organizis du ekskursojn, unu al Arad-Lipova-Radna kaj fortikaĵoj Solymos, kaj la alia al la banloko Moneasa, pri kiuj jam skribis profesorino JUHÁSZ Ibolya aŭ diversaj Esperanto-revuoj.

En la pasinta jaro, ni havis bonŝancon partopreni IKUE-KELI kongreson en Szombathely, Hungario. El nia Asocio partoprenis naŭ personoj. Pri tiu renkontiĝo ni rememoras kun granda plezuro.

Mi kredas, ke post nelonga tempo, Esperanto fariĝos vere Internacia Lingvo en la tuta mondo, la revo de ĝia kreinto L. L. ZAMENHOF.

Eugenia-Ecaterina POPOVICIU, ORADEA

## KIO ESTAS ESPERANTO?

Esperanto estas lingvo, sed ne nur!

Esperanto estis lumo dum la mallumaj jaroj.

Esperanto estas fenestro al la mondo.

Esperanto signifas homojn.

Oni povas veturi ien ajn en la mondo, kaj oni povas vidi interesajojn, sed se oni ne renkontiĝas kaj ne parolas kun homoj, neniun ĉarmon havas la veturado.

Belaj palacoj kaj preĝejoj, interesaj muzeoj troviĝas ie ajn, sed la homoj diversaj estas la plej gravaj.

Mi rememoras pri la plej bela somero de nia vivo, kiam vizitis nin "ĉiuj" esperantistoj de USONO ĝis Koreio, tiu okazis en 1991.

Unue alvenis Klaus el Germanio. Li estis vegetarano, kaj li ege interesiĝis pri politiko. Karlo estis el USONO, kaj nepre li volis edziĝi el Eŭropo! Lin tute ne interesis la bela pejzaĝo ĉirkaŭ la Ruĝa Lago, sed du filmojn li fotis pri ĉevalĉaro, kion li sekvis 6 km-jn. Li observis multajn strangecojn ĉe ni. Praktike de li mi lernis, ke ankaŭ ni povas esti

“strangaj, ne nur aliuloj por ni. Poste alvenis Enver, kiu estis mahometano. Ĉiutage kvinfoje li preĝis. Se Dio amas mahometanojn, ne vane faras, - pensis mi. Fine alvenis Hernao, kiu estis pacifisto. Li rakontis, ke li akceptas nek la armean, nek la civilian servon. Pro tio li vagadis jam de ses jaroj tra la mondo.

Kaj alvenis multaj aliaj, tre diversaj gastoj. Multe ni lernis unu de la alia, sed la plej bela afero estis la fakto, ke ni komprenis unu la alian, parolante la saman lingvon.

BALÁZS Aliz, GHEORGHENI

## ĜUSTIGO!

En la pasinta numero de BAZARO, enla teksto pri ortodoksa preĝejo kun luno en la artikolo “Bihor la lando de varmaj akvoj-Vizitindaj lokoj”, sonas tiel: “Globo kun trimetra diametro, duone ORUMITA”, ne ornamita, kiel erare aperis, ĉar la ora koloro montras la fazojn de la luno. Ekzemple dum lunpleno, la tuta duonglobo estas orkolora, poste kiam la luno malkreskas, ankaŭ la ora koloro malkreskas, la globo nigriĝas.

Vian pardonon petas la red.!

## “NI DANKAS AL DIO, NI DANKAS AL VI”

Nepre mi devas skribi pri belega kaj neforgesebla IKUE Kongreso, kiu okazis en Italio (1997), kie admirinde bone plektiĝis la spirita, kristana vivo kun turistaj kaj amuzaj travivaĵoj, kie okazis du vere historiaj eventoj por Esperanto movado:

- aŭdienco ĉe la Papo (Lia Papa Moŝto parolis esperante);
- aŭdienco ĉe la Itala Respublika Prezidento, Oscar Luigi Scalfaro.

Leginte la inviton de la estraro de IKUE (ili celebris sian 50-an jubielon), “la kongreso estas malfermita al ĉiu bonvola frato kaj fratino”, mi vidis realiĝante mian infanan revon: vidi Romon la CITTA ÆTERNA-n, la urbon de apostoloj kaj imperiestroj.

“Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disciplojn” (Mateo 28,19) estis la kongresa temo, kaj ĝi havis du partojn:

- Romo - pilgrima parto (3 tagoj);
- Rimini - labora parto (4 tagoj).

Tiamaniere ĉ. 20 rumanaj geesperantistoj kun aliuloj el 22 landoj pasigis entute sep neforgeseblajn tagojn en Italio, en spirite riĉa kaj ĝoja esperantista etoso. Nin kunigis la kredo kaj la komuna lingvo Esperanto.

Kompreneble, nia vojaĝo havis ankaŭ turistan aspekton. Ĝi komenciĝis per vizito de urbo Venecio - urbo de lagunoj - unikajo en la mondo, kiel arkitekturo, urbo de centoj da palacoj. Ĉu mi songas?? Ne estis fantaziaĵo, ni promenadis inter centoj da kolomboj sur la placo San Marco - Eŭropa Salono. Ni vizitis la Bazilikon San Marco, konstruita en la XI.-a jc. por lokigi la forŝtelitan korpon de evangelisto, far de Venecianoj. Vespere per ŝipo ni reiris sur la Grande Canale.

Sekvis la ĉefurbo Romo, antikva kaj moderna, konstruita sur la sep montetoj, la koro de kristaneco. Ho, kara bonodora Romo! Ofte vi plenigis niajn okulojn per emociaj larmoj, pilgrimante viajn sanktajn lokojn, vizitante viajn belegajn, historiajn bazilikojn, aŭskultante melodiojn. Mirinda urbo estas vi!

Ni loĝis en la vilaĝo Sassone, en la Instituto Dipatro de la Karmelo, internacia centro por spiritaj kaj edukaj agadoj, je 17km for de Vatikano.

La unua kongresa kunveno estis mescelebro en la Baziliko Sankta Petro, kuncelebrita de 17 pastroj sub gvido de Lia Ekscelenco, Mons. Giovanni Locatelli, ĉe la altaro de la Katedro. "Nia tasko de anoncatoj proponas al ni multnombrajn petojn de repaciĝo. Ekzistas la bezono pardoni, ĉi tiu internacia renkontiĝo de la esperantistoj helpu en ĉi tiu".

Poste ni havis liberajn horojn por viziti la grandegan Vatikanan Bazilikon, ĉe la Pieta de Michelangelo ĉirkaŭbrakumis min la ĉiela dia paco. Ni staris, staris senvorte, silente. La Pieta estas brilega marmora verko. El Vatikano perpiede ni iris viziti la urbon, Koloseon, la Romean Forumon, la diversajn interesajn fontanojn. Romo estas plena de akvaj kaj marmoraj dekorajoj. Survoje akompanis nin itala esperantisto. Ni konversaciis dum la promonado kvazaŭ ni estintus ĉiam geamikoj. Kiel delikata estas la mondfama itala glaciaĵo, ni dankas al s-ino Britta Rehm.

Posttagmeze sur la monteto Kapitolo, en la salono PROTOMOTECA, okazis la inaŭguro de la Kongreso. Ni aŭdis pri amrilato inter Radio Vatikano kaj Esperanto (pastro Borgomeo). Prof. Luciano Corradini diris: "Se oni devas malfermiĝi al interkultura edukado, oni devas alte konsideri ankaŭ ĉi tiun mondan grupon de la esperantistoj, kiuj ne parolas la lingvon de la Homero de la pasinteco, sed la lingvon de la estonta Homero". Ĉiuj aplaŭdis!



Sekvis la vizito al aliaj tri romaj bazilikoj: Sankta Johano Laterana, Sankte Paŭlo ekster la muregoj kaj Sankta Maria la Granda. En la Baziliko de sanktaj Martiroj Johano kaj Paŭlo, laŭ la grek-katolika rito estis bela sankta meso, kiun celebris ukraina pastro helpata de sia edzino. Je la 3-an de septembro la plej granda evento (tago): okazis la partopreno en la ĝenerala aŭdienco de la Papo, en la placo Sankta Petro. "Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, engaĝitajn en sia 50-a Kongreso. Karegaj, la temo de via renkontiĝo reprenas la misian taskon konfidita de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu estas ĉe la bono de la lingvo kiun vi kulturas" - salutis nin en esperanto Papo Johano Paŭlo la dua. Ni ekstaris kaj kriis. Poste delegacio de IKUE donacis al Li ekzempleron de la Roma Meslibro en Esperanto.

Alia grava evento sekvis: aŭdienco ĉe la Itala Respublika Prezidanto, lia ekscelenco Oscar Luigi Scalfaro. En sia rezidejo, en la Palazzo del Quirinale adresis "Saluton al vi ĉiuj." Paroli la saman lingvon ne signifas esti aŭtomate en konsento. Mia danko rilatas ĉefe viajn intencojn, viajn pensojn, vian volon. "Vi daŭrigu por esti konstanta mesaĝo de frateco, amikeco, solidareco kaj amo."

Nia kongreso daŭris en la tre antikva urbo Rimini, episkopa sidejo ĉe la Adriatika marbordo. La Eŭropa-ŝtrando, kie ni havis eblecon aŭskulti interesajn prelegojn kaj iomete somerumi, kaj havi la surmaran krozadon (nokta banado kun gustumado de frititaj fiŝoj kaj de tiuregiona vino).

La unua prelego okazis en la granda salono Espero, pri "Enkulturigo de la kredo en la diversaj Eŭropaj kulturmedioj" de pastro KÓBOR Lajos. La kulturo devus resti por ĉiuj popoloj propra - diris pastro KÓBOR kaj montris, ke la kredo influas la kulturon.

"Ĉu eblas dialogi kun novaj religioj, movadoj aŭ sektoj?" (Battiste Cadei). La dialogo devus esti klara kaj sincera. La situacioj estas ege diversaj, ĉar la sektoj kaj en ili la personoj estas diversaj.

En la preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo ni vidis 15m<sup>2</sup> mozaikon, por memorigi la E-meslibron kaj la unuan papan Paskan Bondeziron al la tuta mondo en Esperanto.

Restos por mi memorinda ankaŭ la vortoj de Mons. Giovanni Balconi: "Sed mi opinias, ke la historio bezonas ankaŭ utopion kaj senpagan laboron, kaj homojn, kiuj senegoisme kaj senbrue donas sin mem, por ke la mondo fariĝu unu koro, kaj en ĝi regadu granda unueco."

Je 30km-a distanco de Rimini, sur la tripinta monto Titano, troviĝas la plej antikva Eŭropa ŝtato, historia sendependa respubliko, la tero de la libereco: San Marino. Ni havis eblecon vidi la belegan panoramon. Tie okazis tiam la solena fermo de la sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj. La Sanktan Meson partoprenis ankaŭ la loka Episkopo.

Sabate, post la fino de la meso, ni vizitis la urbon Rimini, kaj posttagmeze okazis la Ĝenerala Kunveno de IKUE, gvidata de Miloslav SVACEK (unua vicprezidanto). Vespere estis la folkloro programo, kun muziko kaj dancoj, kun rostita fiŝo kaj loka vino.

Dimanĉe estis la lasta tago kiun mi pasigis en Italio, kiam okazis la fermo de la Kongreso, post kio estis celebrita Meso.

“La Kongreso estis organizita amoplene, dank’ al granda Dio, ĉio iris glate” - diris prof. Mario Sola (prezidanto de la Itala Sekcio de IKUE).

La kongreso estis sukcesa, ĉar oni sukcesis plenigi per profunda kaj valora etoso de kristana kaj frata amo.

Nun mi denove revas: pri Internacia Ekumena Renkontiĝo en Rumanio.

LÁSZLÓ Mária, BAIA-MARE

## **OPINIOJ, KONSILOJ, KRITIKOJ, PROPONAJ**

“Ĝia “korpo” ne allogas, bedaŭrinde, sed ĝia “animo” jes. Ĉu ne eblas trovi por BAZARO iom pli allogan titolpaĝon, eĉ se modestan? Lanĉu konkurson por desegnaĵoj por la titolpaĝo.”

SZÁSZ Lenke, PRAID

“Ĝi estas multflanka kaj certe bona kaj necesa ligilo inter la esperantistoj de via lando. Krome ĝi estas rumana voĉo, kiu meritas aŭskultadon de internacia esperantistaro.”

Siegfried KRÜGER, GERMANIO


## La foto de juna Zamenhof

Eble estas pli efike, se oni reklamas Esperanton per ŝildo de la 19-jara Zamenhof (kiam li ellaboris la bazon de Internacia Lingvo). En la jaro 1878 la primitiva formo de Esperanto estis jam preta. Ludoviko festis kun kelkaj kamaradoj en la hejmo de la gepatroj la naskiĝon de la universala lingvo. En 1881 li nomis la lingvon "Lingvo Universala". En 1884 la Lingvo Universala ricevis la formon de la nuna Esperanto. En 1887 aperis "La Lingvo Internacia". Tiam Zamenhof estis 24-jara junulo. Do ne reklamu esperanton per foto de maljuna kaj malsana Zamenhof (antaŭ lia morto).



ASOCIO de ESPERANTO  
C.P. 1111  
RO-3400 CLUJ-NAPOCA  
RUMANIO

IMPRIMATE



al  
PAPP TIBOR  
TROMBITÁS u.12.  
H-4031 DEBRECEN  
UNGARIA